

202
SIFRKO

El la enhavo:

Rekte kaj kuraĝe
Eli Urbanová jubileas
Homonimoj 13
50 jaroj de Lančov
Novuloj en CO UEA
Lingvaj ludoj 9
Libroservo
Umberto Eco kaj lingvoj
KAEST 2002

1
2002

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Eli Urbanová
Nia hetajro dancas ... kaj jubileas

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

rete Starto: starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnický@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

Komerciaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 02/51817732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

Komisionoj de ĈEA: ekzamena, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz

ICO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax.. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz (kontado, membrobazoj)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/20879386

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 069/6815253, zd.heiser@post.cz (EK)

Komitatano-ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, 02-22780677

Kontrolgrupo de ĈEA: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, Libuše Hýblová, Bohotín 136, 789 62 Olšany

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

Lingva kontrolo: Vlastimil Kočvara
Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

... REKTE, KURAGE ...



Karaj legantoj kaj nelegantoj de la revuo de UEA,

kiam antaŭ kelkaj monatoj mi diris, ke mi ne volas esti prezidanto de UEA sed de ĉiuj esperantistoj, la reagoj estis malsamaj, kaj ne mankis kelkaj sinceruloj, kiuj, surbaze de simpla laŭvorta kompreno, ŝoke konstatis, ke tio estas okazo de antaŭanoncita diktaturo. En la realo mi volis diri, kaj praktike ĉiuj komprenis, ke UEA respondecas al ĉiuj esperantistoj, ĉu membroj, nemembroj aŭ duonmembroj kaj ke ĉiuj esperantistoj estas samvalora parto de nia komunumo sendepende de la ekonomia forto de la landoj, en kiuj ili vivas.

Pro tio mi sendas same varmajn salutojn al la nelegantoj de la revuo de UEA. Mi provos alirime de atingi ilin, sed ĉies helpo pri la diskonigo de ĉi tiu saluto estas bonvena.

Novjaraj mesaĝoj kaj kongresaj rezolucioj estas tre malfacilaj tekstoj, ĉar kutime ili konsistas el tro rozkolora penetrado de la realo kaj el listo de plenumindaj agadoj fare de movado, kiu apenaŭ kapablos plenumi ilin. Ni ĉiuj scias tion, sed kial ĝeni la fes-

Novjara saluto de la UEA-prezidanto tan etoson?

Ni provu ĉi-foje alian vojon. Ni provu esti malpli roz-koloraj.

* La movado en ekonomie riĉaj landoj baraktas iom pli ol kutime. Se vi rigardas al la membronombroj en Usono, Italujo, Germanujo ktp., vi vidos, ke la nombroj emas je falo kaj "stagnaŝ" nur en tiuj landoj, kie agema estraro ageme kontraŭbatalas.

Ĉu temas pri vera krizo? Mi ne scias. Ĉiutage dekoj da komencantoj komencas lerni Esperanton rete ekster kiu ajn tradicia kurso kaj abrupte aperas en ret-listoj per tiaj amindaj mesaĝoj: "mi komenci lerni Esperanto pasinta sabato"

Aliflanke, ĉiuj scias, kiom malfacile estas en tradicia kurso igi kursanon esperantisto. En la kazo de retaj komencantoj, tio estas praktike neeblo - kial reta kursfininto volu pagi membrokoton al organizaĵo? Sufiĉas al li aŭ ŝi klaki sur kelkaj TTT-ejoj por trovi multon pli ol oni povas legi.

Nur kelkaj "stranguloj", kiuj volas sperti vivan paroladon, rigardante la kunparolanton en la okuloj, en la fino trovas "la esperantistojn".

* La movado en ekonomie malriĉaj landoj estas en progreso pli ol kutime kun ĉiuj siaj apartaĵoj (je kiuj eŭropanoj komencas al kutimiĝi). Brazilanoj, irananoj, kubanoj, kolombianoj, vjetnamoj, estas pli kaj pli multenombraj kaj aktivaj.

Novjara saluto de la UEA-prezidanto

Aliflanke, jen plia problemo, ili mal-facile trovas sian lokon en organizaĵoj, kiuj estas pensitaj kaj ĝis nun agorditaj por okcidentaj mezklasuloj. Ne temas nur pri UEA, sed pri ĉiuj Esperanto-organizaĵoj (inkluzive de la plej mal-dekstraj kaj revoluciaj).



Ĉi tiuj du supraj konstatoj, laŭ mi, estas la strukturaj kialoj de granda parto de niaj nunaj problemoj. Tamen ne temas nur pri problemoj, sed eble ankaŭ pri mirindaj oportunaĵoj, se ni kapablos utiligi ilin.

Ni devus esti kontentaj, ke Esperanto eniris tre bele en la bravan novan teĥnologian mondon. Ni devus tre multe danki ĉiujn tiujn kreantojn de paĝoj, de kursoj, de tekstoj en la reto. En ĉi tiu okazo nia movado pruvis sian kapablon adaptiĝi al novaj situacioj en mirinda maniero.

Nun simple niaj "tradiciaj" strukturoj devus starigi al si la problemon, kiel utiligi ĉi tiun abundan aktivadon kaj igi ĝin integra parto de la movado.

Kompreneble ni devas esti kontentaj ankaŭ pri la pliiĝo de esperantistoj en ĉiuj landoj de la mondo, kvankam tio povas kaŭzi problemojn por la establiĝintaj rutinoj kaj financaj fluoj. Ĉu finfine nia celo ne estas disvastigi

Esperanton ankaŭ al Etiopujo? Kiu decidis, ke etiopoj estas tro malriĉaj por Esperanto? Mi ĉiam demandis kaj ankoraŭ demandas min, kial "noktaj fantomoj" ne atakas la trankvilan dormon de niaj estraranoj, respondeculoj, ĉef-ĝeneralaj gvidantoj, kiam Esperanto ankoraŭ malĉeestas en Etiopujo, Indonezio, Filipinoj, Paragvajo...

Kaj cetere, parolante pri pozitivaj, ni ne forgesu, ke la sinteno de lingvistoj kaj sciencistoj al Esperanto neniam estis same objektiva kiel nun. Mi ne volas citi anekdotojn aŭ personajn travivaĵojn, sed mi renkontas ĉiam malpli da tiuj kompataj, supercaj ridetoj, kiuj kutimis saluti iun ajn aludon je Esperanto. Tio unuflanke estas gojiga, sed aliflanke devas instigi nin teni ĉiam je alta nivelo la sciencan agadon pri/por Esperanto. Unu soci-lingvistika aŭ esperantologia verko devus same valori kiel unu poemo de enamiĝinta komencanto.

Do, se ĉio plejbonas en la plej bona mondo, ŝajnas tute senbaza tiu fenomeno de "idea rezignismo", kiu atakas partojn de la malnova movado. Esence, eble temas pri la jeno: ni, la esperantistoj, diras, ke la popoloj faru en konsento unu grandan rondon familian. La aliaj diras ke ne, ke la rondo ne estu farata en konsento sed laŭ la reguloj de la Monda Komerca Organizaĵo kaj ke ĝi ne estu familia, ĉar iuj estas regantoj kaj iuj regatoj.

Ĉar multaj kredas je tio, ankaŭ ni kredu je tio (la psihologia premo en multaj landoj estas tro granda, por ke oni ne konkludu tion). Sekve ni serĉu por ni ian pli facilan niĉon, en kiu ni povos debati inter ni pri ni kaj pri niaj pasintaj gloroj for de la granda, freneza mondo.

Ne, karaj geamikoj, ni ne devas fuĝi el la mondo sed vivi en ĝi kaj al ĝi proponi nian solvon, nian vizion kaj la valorojn, kiujn ni efektive sukcesas praktike realigi.

La ideoj pri merkato kaj senkompata venko de la plej forta estas baze kontraŭaj al niaj ideoj. Ni volas mondon justan kaj plurcentran. Ni humile estas la malhumilaj heredantoj de pluraj granduloj: Zamenhof mem, kies kongresaj paroladoj estas daŭre relegindaj por kompreni ĝis kiu grado ni rifuzas militon kaj perforton, E. Privat, I. Lapenna, kaj longa listo da aliaj, kiujn mi ne povas nun plene menci.

Ni estas ankaŭe kaj ĉefe la senmeritaj heredantoj de generacioj da esperantistoj, kiuj batalis, baraktis kaj esperis tra unu el la plej tragediaj jarcentoj, la paŝinta. La heroaĵoj pli aŭ malpli grandaj kaj la solidarecaj agoj faritaj de niaj antaŭuloj trapuntas ĉiujn kontinentojn kaj ĉiujn jardekojn. Memorigi pri kelkaj estus nejuste, sed eble iam iu volos verki verkon pri la "lingvo de solidareco".

Ni estas, do, la fiera Esperanto-movado, kiu dum pli ol unu jarcento faris sian laboron por interkompreniĝo kaj paco sen pagoj kaj sen dankoj, dum la oficialaj instancoj, pagate kaj laŭdate, ofte faris, kaj ankoraŭ nun faras, la malon. Ĉiukaze ni ne havas ion ajn por timi el la komparo kun lastmomentaj merkataj kaj tutmondistoj.

Sed certe ni havas ion por timi el la komparo kun la antaŭaj esperantistaj generacioj. Laŭeble ni intensigu nian agadon soci-utilan favoran al suferantoj en ĉiuj partoj de la mondo. Pri tio, sub la ŝildo "Agado Espero", vi havos okazon legi plue dum la venonta jaro. Ne sufiĉas esti proponata por la pac-premio Nobel, gravas ankaŭ meriti ĝin.

Do, rekte kaj kuraĝe kaj kun la konscio pri tio, ke ni laboras por pli bona mondo, ni daŭrigu nian kutiman laboron: informado, instruado, utiligado.

(Pro la festa etoso mi ne eniros detalojn, sed vi scias pri kio temas.)

Tre feliĉan novan jaron al ĉiuj!

Renato Corsetti

prezidanto de UEA



Eli Urbanová jubileas

Kion alian mi diru pri tiu ĉi ekstraordinara virino ol ke ŝi estas naturforto, vulkano, gejsero, tornado... Sub ŝajne trankvila kaj neniel okulfrapa vango kaŝiĝas lafo da ideoj, kiu iam liberigas sian vojon por foruzi kaj renversi ĉion ĉirkaŭe. Tiel efikas versoj de ĉi esperanta poetino, kiu kun rare nekutima sincereco kaj sen ajnaj barieroj parolas pri la plej intimaj travivaĵoj de sentema femina animo.

Poetino kaj verkistino Eli Urbanová (orig. nomo Eliška Vrzáková) naskiĝis 8.2.1922 en Čáslav en Ĉeĥio. Jam kiel dektrijara ŝi debutis per rakontaĵo *Na makovicích* (Papavberoj) en la gazeto *Narodní osvobození* (1935), kiun sekvis pluaj ses, dume regiona revuo *Podoubraví* alportis ŝiajn kvin versaĵojn. En la jaro 1940, do kiam ŝi estis dekokjara, tiea librovendisto Malý eldonis sian poemaron *Zrcadlo* (Spegulo) sub pseŭdonomo Eliška Doubravská. En la jaroj 1937-41 ŝi studis en pedagogia instituto en la naskiĝurbo kaj samtempe entute ok jarojn vizitadis muziklernejon, fakon piano. Post la matur-ekzameno ŝi akceptis okupon en privata muziklernejo de profesoro Štěpán Urban, al kiu ŝi post nelonge edziniĝis. (Li gvidis gitarsekcion en praga konservatorio.) Ŝi instruadis pianon, violonon, eklernis ludi violonĉelon.

Pri Esperanto ŝi eksciis de nacia artisto Karel Höger, kiu tiam aktivis en Radio Brno en tiel nomata Verda stacio

(Zelená stanice). Pri kontakto kun Höger kaj ŝia konatiĝo kun Esperanto ŝi mem diras: "Pri Esperanto mi la unuan fojon aŭdis de Karel Höger. Okazis tio ankoraŭ dum la milito, ni revenadis el turneo, mi ne plu scias, el kiu urbo, nome Karel Höger, Vlasta Fabiánová, Štěpán Urban kaj mi, lia edzino. Programo, kiun mi sole alrigardis, titolis Malnova ampozio kaj konsistis el recitado kaj gitarludo. Ĉiam temis pri travivaĵo. Tamen ankaŭ pri laco. Vespere tiu streĉo ĉirkaŭ la prezentado, poste oni kutime akceptis inviton de iu el lokaj admirantoj kaj reston de la nokto ni tradormis en trajno. Kiel tion Höger diris: Eĉ se vi interkompreniĝos france, en Francio vi estas fremdulo. Esperantiston, tiun oni atendas en stacidomo, prizorgas al li tranokton. Tio estis io por Štěpán. Li ĉiam sopiris al similaj kontaktoj. Al tio, ke iu invitu lin ekzemple en Italion. Tial ankaŭ, kiam li hazarde ekvidis afiŝeton pri Esperanta kurso, li min tien sendis, por ke mi konstatu kiel Esperanto sonas. Estis tio antaŭ kristnasko, tenebro kiel en sako, kiu emas foriri de varma forno? Mi memoras, ke mi venis hejmen, la vangoj al mi brulis. Kion rakonti, Esperanto tuj entuziasmigus min!"

Do tiel ĉio komenciĝis... Pri Höger ankoraŭ ĉi tion, ke ŝi intervjuis lin kurte antaŭ lia subita morto en la jaro 1977 jam kiel sperta esperantistino.

Rara dokumento tre favora por Esperanto! Sed ni antaŭkuras. Intertempe ni estas en jaroj kvardekaj. La poetino diligente konatiĝas kun sekretaĵoj de Esperanto, de la jaro 1949 estiĝas ano de Esperanto-klubo en Prago, en la jaro 1950 faras ekzamenon pri la lingva scio de Esperanto, post jaro ekzamenon pri kapableco instrui Esperanton, kaj komencas verki siajn unuajn versojn en tiu ĉi lingvo. Kvazaŭ per eksvingo de sorĉa vergeto naskiĝas originala Esperanta poetino, kiu sian kreadon en la ĉeĥa jam por ĉiam forlasis. En la jaroj 1952-77 ŝi gajnis entute 12 premiojn por originala Esperanta poezio. Klare, ke multe helpis al ŝi ankaŭ ŝia dujara korespondado kun signifa hungara poeto Julio Baghy, ja li zorgis pri ŝia artisma evoluo kiel "vera paĉjo". En la jaro 1955 post la nuligo de la edzeco ŝi revenas al sia origina okupo. Entute dek jarojn ŝi instruas en fundamenta lernejo. Intertempe ŝi estiĝas en la jaro 1956 unu el 20 fondintoj de Esperanta Internacia Verkista Asocio. En la jaro 1960 aperas ŝia unua Esperanta kolekto Nur tri kolorojn kun antaŭparolo de Julio Baghy. Eldonis ĝin eldonejo Stafeto en Kanariaj Insuloj kun ilustraĵoj de Karel Oberthor. Ni citu la aŭtorinon:

"Antaŭparolon verkis hungaro, ĉeĥo ilustris ĝin kaj hispano ĝin eldonis." Ni menciu ankoraŭ ŝian partoprenon en Universala Esperanto-Kongreso en Sofio (1963) kaj

Budapeŝto (1966). De la jaro 1965 ŝi aktivis kiel edukistino kaj pli poste kiel gvidantino de lerneja klubo en lernejo en Prago 8, entute ree dek jarojn. En la jaro 1969 ŝi instruas Esperanton en angla Barlastono. En la sama jaro eliras ŝia Esperanta kurso por la komencantoj en la gazeto *Pionýrská štafeta*. En la jaro 1975 eldonas Ŝtata pedagogia eldonejo ŝian metodikan helpilon por edukistinoj "Por ke ili estu homoj". Ĝia dua eldono titolita Edukaj interparoloj en postlernejaj gardejoj aperas en la jaro 1984. En la jaroj 1974-84 ŝi propagas Esperanton en diversaj gazetoj, radio, televido. Anoj de esperanto-rondeto, kiun ŝi gvidis en kadre de lerneja klubo, korespondas, imagu, kun tridek landoj! Eli Urbanová estiĝas internacie konata personeco kaj renoma Esperanta poetino, unu el tri en la mondo plej konataj (kune kun Hilda Dresen kaj Marjorie Boulton).

De nun jam pli koncize pri ŝia artisma kariero: En la jaroj 1975-77 ŝi kiel ano de internacia komisiono prijuĝas Esperantan poezion. Rezultoj de la konkuro estas anoncataj dum Universala Esperanto-Kongreso aranĝata ĉiujare, ĉiam en alia lando. En la jaro 1979 ŝi gajnis honordiplomon por eminenta longjara laboro en Esperanta movado kaj dumvivan membrecon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Samtempe ŝi ricevis honor-insignon de MEM - Mondpaca Esperanto-Movado.

De la jaro 1980 ŝi laboras kiel ano en artliteratura sekcio de ĈEA fondita de Jiří Karen. En la sama jaro ĈEA eldonis ŝian duan kolekton *El subaj fontoj*. En la jaro 1982 ŝi estas nomita honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. En la jaroj 1986-95 ŝi kiel unu el du virinoj (la dua estas anglino M. Boulton) laboras en Esperanta akademio, kiu havas 45 anojn el diversaj landoj. Ŝian trian kolekton *Verso kaj larmo* eldonas en la jaro 1986 eldonejo ILTIS en Saarbrücken: De la jaro 1990 ŝi estas ano de *Obec spisovatelů* (Civito de verkistoj), en la jaro 1994 ŝi estas vicigita en internacian vortaron *Who is Who*. En la jaro 1985 aperas ŝia aŭtobiografia prozo *Hetajro danças* eldonita de brazila eldonejo Fonto. Por tiu ĉi verko ŝi gajnis premion dum la 14-a internacia konferenco de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperantaj Konferencoj) okazinta en la tagoj 14-a-20-a de julio 2001 en Strážnice. Ŝi estis unu el kvin kandidatoj, kiu venkis en sekreta balotado. Laŭdire "kvazaŭ mi ricevus Oskaron!" En unu recenzo pri ŝia *Hetajro danças* oni skribas: "Nekredeble! Ĉu tio estas en Esperanto ebla? Ĉu toleras tion nia movado? Io tia ĉe ni ne ekzistas kaj en kelkaj literaturoj similaj libroj kapablas haltigi promesplenajn karierojn kaj kaŭzi politikajn krizojn. Kiam vi al vi tiun ĉi libron aĉetas, vi tenos en la manoj unu el la plej kuraĝaj aŭto-biografioj (ne nur Esperantaj). En la antaŭparolo diras Josef Rumler: "Verki aŭtobiografion mi al Eli ne proponis hazarde. Ŝia sorto indas je prilaboro. Sed estis ĉi tie ankoraŭ unu motivo. Eli tiam perdis ŝian plej

proksiman homon kaj ĉi tasko - tasko treege pretenda - estos por ĉi tiu plej konvena terapio." - Sed ni devas ankoraŭ kompletigi pluajn ŝiajn kolektojn. En la jaro 1996 estas eldonita kolekto *Vino, viroj kaj kanto* pere de brazila Fonto. La saman jaron estas eldonita ŝia kolekto *Peza vino / Těžké vino* de la eldonejo KAVA--PECH en Dobřichovice ĉe Praha, kie estas en spegula Esperanta-ĉeĥa teksto prezentitaj tradukoj de Josef Rumler. - En la jaro 2001 eldonas brazila Fonto ŝian intertempe lastan Esperantan poemaron *El mia buduaro*. Tio estas nur fluga rigardo el la vivo kaj kreo de tiu ĉi ekstre aktiva virino, kiu ankoraŭ en la jaro 1996 prijuĝis Esperantan poezion okaze de festivalo en Verona. La saman jaron ŝi partoprenis Universalan Esperanto - Kongreson en Prago, dum kiu ŝi estis nomita honora ano de Universala Esperanto-Asocio. Kiel jam dirite, Eli Urbanová verkas nur en Esperanto. Ŝiajn poemojn publikigas dekoj da internaciaj Esperantaj gazetoj de Skotlando ĝis Kolumbio kaj Aŭstralio.

Unuopaj poemoj estis tradukitaj en ok lingvojn. En gazeto Aŭroro ili aperis eĉ en blindula skribo.

Kelkaj poemoj estis muzikigitaj (ekz. poemo Rozo - Růže, kun baritona solo de Bohdan Gselhofer, poemon Paco muzikigis Otakar Maršik, kelkajn pluajn komponistino Vlasta Šmejkalová).

Mi ĝojas, ke mi renkontis ĉi tiun naturfortecan poetinon, sorĉistinon de vorto, kaj ke mi estas kun ŝi ĉiam en amika kontakto.

Ĉestmír Vidman

Josef Kavka 80-jara

la honora membro de ĈEA deziris anstataŭ omaĝaj vortoj, ke Starto publikigu daŭrigon de lia serio pri homonimoj, kiujn ni finis en 1997 per 12-a parto.

Homonimoj en Esp-o, konsiderataj nomenklature

13

-iv-

La tradicia titolo de niaj konsideroj ĉi-okaze tuŝas nomenklaturan problemaron nur escepte. Ja temos plej eble pri terminologio de diversaj fakoj, kiel konsekvenco de la sufiksapliko ne sole en Esperanto, sed jam en ĝiaj latinidaj fontoj.

En PIV ni legas pri -iv-: Neoficiala sufikso montranta, ke iu aŭ io kapablas fari ion. Inter tieaj ekzemploj troviĝas: pagiva kliento, produktiva grundo. En PAG (1980, p. 466) oni parolas pri neoficiala "sufiksoido", kies signifo estas -pova, -kapabla. Inter tieaj ekzemploj troviĝas: ĉagreniva, elvokiva, impresiva, konfuziva, konsterniva. Aliflanke, prave PAG (p. 477) parolas pri "pseŭdo-sufiksoido", do radikparto -IV- en ekzemploj jenaj: nominativo, indikativo, defensivo, ofensivo, efektiva k.t.p.

Tamen, nin interesas nur okazoj de homonima koincido inter -IV-oj sufiksa kaj radikfina.

Inter la fundamentaĵoj ni trovas jenan

okon:

1. **adjektivo.** La latina verbo *adicere*, etimologie identa kun la esperantlingva *adicii*, origine signifis "alĵeti", do adjekto estas "alĵetaĵo". Certe ni ne perdu tempon, por solvi la gramatikan rebuson de la vorto adjekt-iva!

2. **aktiva.** Same ni ne cerbumu, kion povus signifi la verbo "akti", apartena al la oficialaĵo: akto.

3. **dativo.** Male, bonorde ekzistas la verbo dati. Sekve, dat-iva povus signifi: kapabla skribi daton ...

4. **efektiva.** Same ekzistas la verbo efekti, do efekt-iva signifus: efektopova.

5. **genitivo.** Jen okazas koincido eĉ duobla: pri la problemoj kun -IT- traktas nia ĉapitro 12-a. Tamen, ĉu geno, la hereda elemento, povas verbiĝi? Se jes, kiusence? Kaj: kombini sufikson pasivan -IT- kun la aktiva -IV estus absurde ... Do ni referencu al la supre menciita PAG-a "pseŭdosufiksoido" = radikparto.

6. **konservativa.** Analoga absurdaĵo estus kombini -AT- kun -IV-.

7. **masivo** bone elvokas amasigon de maso, kvankam la verbo "masi" apenaŭ estas renkontata.

8. **olivo** (*Olea*), la utilega oleriča frukto de l' arbo, kiu meritis la internacie kodigitan botanikan nomon oleo el la familio de oleacoj (*Oleaceae*), apenaŭ povus iel koneksi kun la fundamenta



konjunkcio: ol. Tamen, el la vidpunkto nomenklatura meritas nian mencion la stranga fakto, ke PIV registras sub la kapvorto olivo la familinomon oleacoj, sed sub oleo inter la koncernaj signifoj mankas tiu de olivarbo. Jen plua dokumento de homonimfobio ...

El la vortoj oficialaj kaptas nian atenton jenaj (21):

9. **alternativo**. Ni ne komentu, sed referencu al analogeco kun 6.

10. **arkivo**. Laŭ la fontlingva kaj fundamenta fonetiko, ni voĉdonus por arĥivo; ja ĝi devenas de la latina *archivum* kaj tiu ĉi de la helena *arĥe* = komenco. Alian etimologion havas arko, latine *arcus*. Konfuzi la velarojn frikativan Ĥ kaj okluzivan K signifas generi superflujajn homonimojn en la sfero terminologia-nomenklatura.

11. **demonstrativo**, kp. ree kun 6.

12. **indikativo**, same.

13. **kolektiva** liveras naturan homonimecon kun kolekt-iva, t.e. kapabla kolekti.

14. **kursivo**. Se PIV allasas la ne-transitivan (ntr.) verbon kursadi = iradi laŭ vojlinio, oni devus premi ankaŭ la same ntr. kursi. Sekve ne eblus la homonimo kurs-iva.

15. **motivo**. Moto, laŭ PIV zamenhofa, kapablus doni la transitivan (tr.) verbon moti, ĉe kiu estus pensebla akcepto de la sufikso -IV-.

16. **objektiva**. Kun la neoficiala objektivo kaj la fundamenta objekto ĝi liveras plejadon de diversfakaj nocioj. Sed ĉu

ekzistas verbo "objekti"?

17. **optativo**, kp. ree kun 6.

18. **pasiva**. La verbo pasi estas ntr., do kp. ekz. kun 14.

19. **perspektivo**, ĉu homonima kun per-spekt-ivo?

20. **pozitivo**, same kiel 5.

21. **primitiva**, same kiel 5.

22. **recitativo**, same kiel 6.

23. **relativa**, same kiel 6.

24. **respektiva**. Jen tri homonimoj konsiderinde diverssencaj: re-spekt-iva, respekt-iva, respektiv-a.

25. **salivo**, kvankam iom salhava (mal-forte alkala), liveras la homonimon sal-iva, t.e. kapabla meti salon ekz. supen. Ŝerce dirite, gastej-kuiristo emas esti tro "sal-iva", por ke oni mendu pli da biero ...

26. **spekulativa**, same kiel 6.

27. **subjektiva**, simile kiel 16, krom tio, ke mankas optika "subjektivo", analoga al la lenso objektiva.

28. **transitiva**, same kiel 5.

29. **vokativo**, same kiel 6.

Restas neoficialaĵoj (44):

30. **adventiva**, la termino botanika, ja havas nenion komunan kun la tempo antaŭkristnaska.

31. **agresiva**, la vorto zamenhofa, post la lanĉo de la sufikso -IV-, fakte devus ne registriĝi kiel radiko agresiv-, do devus sinonimi kun la pli esperantlingva, sed malpli internacia: agresema.

32. **akreditivo** = kreditletero. Akredit-iva havus iom diverĝan sencon, ĉar la zamenhofa verbo akrediti estas tr., do kapablas alpreni la sufikson -IV-.



33. **akuzativo**, same kiel 6.
34. **aperitivo**, same kiel 5.
35. **detektivo** (zamenhofa), kiel "detektisto", homonimas kun elektrofaka kapablo detekti.
36. **direktivo**: direkt-ivo.
37. **diskursivo**, kp. 14.
38. **durativo**, same kiel 6.
39. **ekzekutivo** kunportas homonimon nedezirinde amaran: ekzekut-ivo!
40. **faktitivo**, same kiel 5.
41. **fakultativo**, dame kiel 6.
42. **finitivo**, same kiel 5.
43. **gingivo** (latine gingiva) = dento-karno, sed ĉu la onomatopeo ging povas doni la tr. verbon?
44. **incizivo** = tranĉodento, incizi = tranĉi, do inciz-ivo estas tranĉopovo.
45. **iniciativo** = iniciat(em)o, ĉu do la -iv-a radiko ne estas superflua? Kp. kun 31.
46. **injektivo** = speco de parolsono, injekti (zamenhofa) estas tr. verbo, do injekt-ivo estas kapablo enŝprucigi fluidaĵon.
47. **intensiva** = intensa 2 (laŭ PIV), sed intensi estas verbo ntr.
48. **interpozitivo**, kp. kun 20 kaj 5.
49. **karminativo**. Karmino, la fundamentaĵo povas doni verbon tr., sed cetere kp. kun 6.
50. **komparativo**, same.
51. **kompletiva**, la gramatika termino, ne povas koincidi kun komplet-iva, ĉar la verbo kompleti ne estas tr.
52. **konektivo**, la mezenhima histo, homonimas kun kapablo konekti. En la botanika, ekz. mikologia terminologio, oni renkontas la epiteton connectivus.
53. **kooperativo** = koopera societo; kooperi estas ntr. verbo, cetere kp. kun 6.
54. **kultivi** (zamenhofa) homonimas kun kult-ivi, ĉar ankaŭ kulti estas tr. verbo.
55. **lokativo**, same kiel 6.
56. **paliativo**, same.
57. **partitivo**, same kiel 5.
58. **predikativo**; la fundamenta predikato ŝajnas doni verbon ntr.
59. **progresiva**, kp. kun 31, sed la fundamenta verbo progresi estas ntr.
60. **projektiva**, rilata al projekcio, koincidas kun kapablo projekti ekz. ekskurson, por teni la PIVan ekzemplon.
61. **prospektivo**, laŭ PIV scienco, certe havas nenion komunan kun la oficialaĵo prospekto.
62. **radioaktiva**, kp. kun 2.
63. **recesiva** = ceda, sed ĉu recesi povas esti tr.?
64. **refleksivo**, ĉu same pri refleksi?
65. **retrospektiva** (zamenhofaĵo), kp. kun 24.
66. **rilativo**, la gramatika termino, ne povas koincidi kun rilat-ivo, pro la netransitiveco de la verbo rilati. Tamen, PIV registras jenan ekzemplon: En Esperanto la adverba participo ĉiam rilatas la subjekton (!) de la ĉefa propozicioZ ...
67. **sedativo**, la medikamento, sedo (Sedum) el krasulacoj, sed kp. kun 6.
68. **sensitivo**, la komunuzo nomo por la sentema mimozo, sed cetere kp. kun 5.



69. **solivo**, speco de trabo, sed soli estas ntr.

70. **stativo**, simila okazo.

71. **vegetativa**, kp. kun 6.

72. **volitivo**, kp. kun 5.

73. **aviv(ad)o** el EB (1988) ne povas koincidi kun av-iv(ad)o, ĉar la verbo "avi" devus esti ntr.

Traktinte la suprajn 73 okazojn de teorie aŭ praktike eblaj koincidoj inter sufiksa kaj radikfina -IV- en la leksiko de Esperanto, certe ni ekvidis nur malgrandan parton ("pinto de glacimonto") el la problemaro. Terminologie kaj nomenklature ekzistas multegaj ekzemploj, ĝis nun ne registritaj en Eo-vortaroj. Fakuloj devos cerbumi, kiel esperantigi la fungonomon *Hygrophorus arbustivus*, la medicinan terminon *molestiae digestivae*, la genetikan terminon *gametae receptivae* k.t.p., k.t.p. Terminologioj jes permesas, ke Eo iel elturniĝu surbaze de sia propra vortrezoro, sed nomenklaturaj estas senkompare pli rigidaj. Misformi ekz. ĥemian, biologian, geografian aŭ alian nomon nur tial, ke ĝin konsistigas la radikfina -iv-, certe estus apenaŭ rekomendinde.

Fontoj

- * Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.
- * Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (1980), K. Kalocsay - G. Waringhien. Kvara, tralaborita, eldono. - Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.
- * Esperanto Bildvortaro (1988), R. Eichholz. - Esperanto-Press, Bailieboro.
- * Inversa Vortaro de Esperanto (1989), B. Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborno.

Nova muŝo el tropikaj landoj

Sekvte de plivarmiĝo de klimato en Eŭropo aperas en nia lando varmamaj bestoj, kiuj devenas el pli varmaj landoj. Muŝo *Chrysomya albiceps* (Wiedemann, 1819) el familio *Calliphoridae* estas ordinara en sudaj landoj, ekzemple en Brazilo, Egiptio kaj Hispanio.

En la jaro 1958 ĝi aperis en suda Moravio, sed denove malaperis. En la jaro 2001 ĝi reaperis en suda kaj meza partoj de Moravio.

La muŝo estis iomete pli granda ol hejma muŝo. Ĝia korpo estas verda, metale brilanta.

La okuloj estas brunaj kaj la fronta bendo estas blanka. La torako ne havas haregojn. Segmentoj de la abdomeno estas verdaj, metale brilantaj kaj blue borderitaj. Oni povas laŭ la blua bordero de abdomenaj segmentoj facile distingi *C. albiceps* disde similaj muŝoj de la genro *Lucilia*. La flugiloj de *C. albiceps* transiras la abdomenon. La muŝo flugas rapide, ĝi estas eminenta fluganto.

La femaloj de *C. albiceps* metas ovetojn sur mortaj korpoj de bestoj. La larvoj estas rabaj. Ili predas kaj voregas larvojn de aliaj muŝoj.

Belega tropika muŝo *C. albiceps* fariĝis nova dekoro de nia naturo.

O. A. Fischer



MUZEUM PICTUS

alivorte muzeo bildigita estas titolo de broŝuro, kiun okaze de la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 eldonis Muzeo Komenio en Přeřov, fako historio de lerneja instruado. Koloraj bildoj kun historiaj klasĉambroj kaj instruiloj el pasintaj jarcentoj estas akompanataj de komentoj en la lingvoj ĉeĥa, pola, angla, germana kaj ankaŭ Esperanto. La Esperanta versio estas laboro de lokaj esperantistoj (precipe L. Chytil) kaj pruvas aktivecon de niaj Přeřovanoj. Laŭ atentigo de Mgr. Z. Hršel la latina titolo ne estas ĝusta, devus esti *Muzeum Pictum*, ĉar muzeum havas alian genron ol *orbis* (la titolo certe aludas la faman *Orbis pictus* de Komenio). La grafikisto elpensis novan, iom strangan Esperantan flagon, tamen la ideo aldonadi al similaj verkoj ankaŭ Esperantan version estas certe imitinda.

ČESKÁ TŘEBOVÁ

urbo sub la rotondo, estas faldfolio pri la urbo, en kiu troviĝas sidejo de nia Esperanto-muzeo. Tial ne surprizas, ke apud la tekstoj ĉeĥa, germana kaj angla aperis ankaŭ Esperanto (Jiří Pištora), ĉifoje kun ĝusta flago, sed bedaŭrinde la presejo ne posedis Esperantajn signojn kaj uzis x-kodon (ux, cx, gx ktp.), kio iomete mirigas ĉe modernaj komputilaj programoj. Kolorajn fotojn akompanas sur la lasta paĝo malgranda urboplano.

INVITO AL NOVA RENKONTIĜO

EK Plzeň organizas turisman renkontiĝon de esperantistoj meze de belega naturo en la urbeto Plasy (25 km norde de Plzeň en ripozloko MÁJ), kiun oni realigos en tagoj 14.6.-16.6.2002. Dum tiu ĉi renkontiĝo okazos k.a. ekskursoj per buso aŭ per trajno aŭ piedpromenoj en interesa ĉirkaŭaĵo. En la loko estas ankaŭ ebleco por naĝado. Vespere amika amuzo, kompletigita per videokasedoj pri interesajoj de la regiono. Loĝado en plurlitaj ĉambroj, manĝo 3-foje dum la tago, la prezo de la restado 250 Kč por unu tago. Pliajn informojn disdonas kaj aliĝilojn kun naskiĝdato kaj adreso akceptas: Václav Kaprál, 331 51 KAZNĚJOV 252, ĝis fino de majo 2002. Ĉiuj estos bonvenaj.

SKOKOVY

La regula semajna lingva seminario en Skokovy en pensiono ESPERO okazos printempe de 22a de aprilo 2002. La aranĝo estas konvena por interesantoj pri Esperanto en ĉiuj gradoj de lingvoscio. Partoprenadas eĉ eksterlandanoj. Interesantoj povas aliĝi skribe, telefone, rete:

Jindřiška Drahotová
Sadová 745/36
293 01 Mladá Boleslav
0326/731845 vespere
majle: vanek@europe.com
aŭ drahotovaesperanto@seznam.cz

La 1-a Somera Esperanto-Tendaro kaj kio okazis antaŭ ĝi

Pri Esperanto mi eksciis el postlasaĵo de mia patro, kiu antaŭ la 2-a mondmilito instruis lingvojn en Ba'ŭ eksperimenta lernejo en Zlín. Ĉu li tie instruis ankaŭ Esperanton, mi ne scias. Sed li vigle en Esperanto korespondis. Ankaŭ li kiel germano estis membro de Germana Esperanto-Asocio en Liberec. Pli poste li protestis kontraŭ la milito kaj pro tio li estis fare de nazioj ekzekutita.

De la gazeto de ĉeĥaj geskoltoj "Junák" mi en la jaro 1947 eksciis, ke en nia lando ĉe Junák organizaĵo o ekzistas fako de Skolta Esperanto-Ligo. Tuj mi kun ceteraj geskoltoj el nia urbo aliĝis. Same ni aliĝis al la aŭtuna kurso de Esperanto, kiun ĉe la komerca akademio gvidis amiko de mia patro, aŭtoro de famaj Esperantolibroj, profesoro Theodor Kilian.

En la jaro 1948 komencis regi en nia respubliko komunistoj, kiuj kontraŭstaris skoltismon kiel okcidentan, imperiisman organizaĵon, kiu laŭ ili servas al malamiĵoj de socialismo ĉe ni konstruata.

En la jaro 1950 estis la skolta organizaĵo en nia respubliko likvidita. Multaj de ni, geskoltoj, estis gvidantoj de la skoltaj grupoj, trupoj kaj lupidgrupoj kaj tuj kun siaj grupoj trairis al Esperanto-klubo. La komitato de Klubo kun sia klubestro prof. Theodor Kilian honorigis nin per la titolo de Esperanto-Junularo.

En nia Junularo tiam laboris ĉirkaŭ 200 gejunuloj. La Esperanto-Klubo pruntedonis al ni du malgrandajn ĉambrojn, kie ni kunvenis de dimanĉo al dimanĉo posttagmeze kun sia programo kaj E-kursoj.

Laŭ soveta modelo estis ĉe ni fonditaj grupoj de pioniroj. Situacio iom trankviliĝis. Ni, gvidantoj de E-junularo pripensis eblecon prepari dum somero tendaron, en kiu oni instruu Esperanton. Spertuloj Joĉjo Bublan, Olga Hrubešová, Jaro Habeš kaj mi komencis la tendaron prepari. Ni elektis la lokon ĉe Vranov akvobaro en golfo de Chvalatice. La loko estis vere magia. De mateno ĝis vespero vi povas aŭdi nur birdojn, kiuj bele kantas aŭ iam vidi leporojn, kapreolon, iam ankaŭ vulpon.

Ne forgesu, ke estis la jaro 1952. Sep jarojn post la milito. Tendojn kaj ĉiun materialon por tendumi, kiun ni havis kiel skoltoj, ni devis transdoni al pionirgrupoj. Sen tendoj ne estas eble tendumi. Helpis al nibonaj homoj - trampo kaj vagabondoj. Ankoraŭ ekzistis distribua nutraĵsistemo. Ĉiu devas doni nutraĵkuponojn. Kaj kiel atingi la tendarlokon? Laŭ skolta maniero. Pli junaj veturis per vagonaro al stacio Šumná kaj de ĉi tie iris perpiede 12 km al tendarloko. Pli aĝaj iris piede de Třebíč. Nur 50 km. Bedaŭrinde aŭton tiam neniu havis. Per aŭto oni de Šumná alportis lignotabulojn, el kiuj ni konstruis tendojn.

La duan tagon oni jam povas instrui la lingvon. Kiel instruisto venis prof. Kilian, instruis, Jan Werner, Jaroslav Voda.

Rememoroj de skolto

En 1953, kiam mi estis 10-jara, mia samklasano Jirka Stejskal venigis min en la klubejon Esperanto ĉe la stacidoma strato en Třebíč. En du ĉambretoj estis dudeko da samaĝaj knaboj, kiujn gvidis tri junuloj je 9-15 jaroj pli aĝaj: Pepík Bublan, Pavel Sittauer kaj Ruda Čermák. Ĉiu el ili sciis ion aliajn: Pepík kaptis nian atenton per interesaj ludoj kaj streĉa rakontado de aventuraj historietoj, Pavel instruis al ni Esperanton kaj Ruda kapablis citi ĉiun vorton retrodirekte. Tuj la unua kunveno entuziasmigis min kaj ĉe neniu plua mi mankis. Ni havis bildon de monto, kies supro simbolizis finon de la lernojaro kaj sopiratan ferian tendaron kaj tien ni devis grimpi per poentoj akirataj dum sabataj kunvenoj. Miaj gepatroj posedis duetaĝan trunkodomon sur la bordo de la rivero Jihlava. Sur la apuda herbejeto ni konstruis ses dupersojnajn tendojn kaj dormis sur pajlosakoj. La du semajnoj estis plenigitaj per amuzoj kaj devoĵoj: ludoj, vetkuroj, olimpikoj, naĝado, ekskursoj kaj tendarfajroj, sed ankaŭ laboroj en la kuirejo, aĉetadoj kaj nokta gardado. Krom tendarfajra bonhumora rakonto "Sekreta eksplodo sub la kusenego" mi memoras ankaŭ iometon el Esperanto ("Kio estas tio? Tio estas bovo."). La temon dokumentas kelkaj etaj senkoloraj fotoj. Mi volus danki al nia estro Pepík Bublan kaj ankaŭ al Pavel Sittauer, kiu ebligis ĉion sub la ŝildo de Esperanto kaj kiu konstruis en Lančov tendaron, kiun ankaŭ mi dufoje partoprenis.

Rosta - Leopardo



En la sama jaro okazis ankoraŭ unu simila tendaro, kiun organizis Esperanto-Junularo de silezia urbo Opava ĉe la rivero Moravice.

Pavel Sittauer

(Sur la unua foto "Divočák 1954", sur la du aliaj Lančov en la 90-aj jaroj.)

(Dekstre - rememorojn de ing. Rost'a Novák, sekretario de Urba Konsilantaro en Třebíč, esperantistigis la redaktoro)

50-a Somera Esperanto-Tendaro Lančov 2002

En ĉi tiu jaro, kiam ni festos 100 jaroj de esperantista klubo en Prago kaj havos 10-an kongreson de ĈEA, realiĝos ankaŭ la jubilea 50-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud la digolago de Vranov, organizata de EK Třebíč.

La kursoj de **Esperanto** kostas 2500 Kč, por infanoj ĝis 15-jaraj 2300 Kč. En la tria etapo la tendaro proponas ankaŭ specialajn kursojn de **plastikaj artoj** kaj **ŝako** (2980 Kč, por infanoj 2780 Kč). Same kostas ankaŭ la kursoj de la angla, germana, franca, rusa kaj hispana lingvoj, kiujn la tendaro devas okazigi pro ekonomia promeo.

Krom la kursoj 30.6.-13.7. (1-a etapo E, A, N), 14.7.-27.7. (2-a etapo: E, A, N, F, R, H) kaj 28.7.-10.8. (3-a etapo E, A, V, plastikaj artoj, ŝako) en la tendaro **renkontiĝos iamaj tendaranoj** (9.8.-11.8.). Dum la etapoj realiĝos ankaŭ ekskurso al Vieno (220 Kč), promenoj al Hardegg (25 km), Vranov (7 km), Bítov kaj Cornštejn.

Ekster la etapaj datoj la tendaro estas mendebla ankaŭ por aliaj aranĝoj aŭ feria ripozado.

Informojn kaj aliĝilojn sendos **Esperanto, 674 01 Třebíč**, tel/registritilo: 0618/850 196, tel/fakso: 0618/841 909, e-mail: podhradska@volny.cz.

Pri ŝako petu informojn ĉe: **Ŝachový klub**, pan Hodovský, 664 64 Dolní Kounice 407, tel: 0502/422 284, skdk@volny.cz.

Pri TEJO-kongreso 2001

Fratinoj Daďka kaj Vladka Chvátalová el Světlá nad Sázavou sukcesis publikigi en la decembra numero de la loka urba periodaĵo *Světelský zpravodaj* pli ol unupaĝan artikolon pri internacia renkontiĝo en la franca urbo Strassbourg (sidejo de Eŭropa Parlamanto kaj Eŭropa Konsilantaro). Ili prezentis la someran Internacian Junularan Kongreson de TEJO kiel aranĝon por multkultura edukado de junularo el la tuta mondo per Esperanto. Ekzemple en la urba parko Citadelle la partoprenantoj prezentis siajn naciajn lingvojn (la ĉeĥa kompreneble ankaŭ ne mankis). Okazis konversaciaj kursoj, sed precipe praktikado dum ekskurso tra la urbo kaj al najbaraj urboj en Germanio aŭ dum koncertoj de moderna muziko en Esperanto.

LA UNUA

ESPERANTO-SIMFONIO JAM HAVEBLA KOMPAKTDISKE!

La Simfonio N-ro 1 (Esperanto) por mezsopranulino kaj orkestro de D-ro David Gaines estis surbendigita de la Moravia Filharmonika Orkestro de Ĉeĥio sub la gvido de dirigento V. Micka, kun kantistino Kimball Wheeler, en oktobro 2000. Jen la unua simfonia muzikaĵo por orkestro iam ajn komponita uzanta tekston en la internacia lingvo Esperanto!

La muzikfirmao "Verda Stelo Music" anoncis, ke la kompaktdiskon eldonis la usona firmao "MMC Recordings" kun pluaj verkoj de D-ro Gaines.

(RET-info)

DEMOKRATIO KIEL AKTIVIGA FORTO

Osmo Buller respondas

Osmo BULLER, proklamita kiel la esperantisto de la Jaro 2001, afable konsentis respondi al demandoj de "La Ondo de Esperanto", el kiuj ni elektis la plej interesajn.

DEM: La internacia elektantaro honorigis vin pro la sukcesa kaj rezultoriĉa deĵoro en Roterdamo, interalie pro la Gazetaraj Komunikoj, kiuj atingas rekte aŭ per aliaj informiloj praktike la tutan esperantistaron.

OB: Gazetaraj Komunikoj naskiĝis en majo 1998. Unue mi fakte intencis lanĉi internan informservon por komitatanoj, ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA pri la praktika funkciado de UEA kaj precipe de la Centra Oficejo, ĉar mi ĉiam sentis kiel grandan ĝenon la nesufiĉan informitecon de tiuj kernaj funkciuloj. Poste devis sekvi renasko de la iama Internacia Gazetara Servo de UEA por la E-gazetaro kaj ekstera publiko. Mi tamen konkludis, ke la laborforto ne sufiĉas por dece funkciigi ambaŭ, tiel ke GK fine naskiĝis kiel ilia miksaĵo. Mi kredas, ke almenaŭ la informado inter esperantistoj pri la agado de UEA fariĝis pli efika, sed pri la ekstera informado restas ankoraŭ multo por fari.

DEM: Kiel vi nun ĉe via foriro retrorigardas vian vivon en Roterdamo?

OB: Kiel mi diris ankaŭ en mia demisia letero, mi foriras almenaŭ 2-3 jarojn pli frue ol mi origine planis kaj sekve mia laboro multilate restis nefinita kaj la realigo de pluraj planoj eĉ ne povis esti komencita. Mi tamen estas kontenta ekzemple pri tio, ke mi povis kontribui al financa ekvilibro de la Asocio, al la vigligo de la eldona agado kaj, antaŭ kelkaj jaroj, al la savo de la oficialaj rilatoj de UEA kun UN kaj Unesko. Mi nepre devas menciigi ankaŭ la stabilan kaj efikan funkciadon de la CO -- laŭ iuj la CO funkciis eĉ tro efike -- kaj mia plej granda perdo nun estas disiĝo de miaj multjaraj gekolegoj.

DEM: Ĉu laŭ viaj spertoj UEA bezonas iajn reformojn?

OB: La demokratio en UEA devus esti plifortigita. Unue, individuaj membroj nun elektas nur dekonon el la membroj de la Komitato, kvankam el la tuta membraro de UEA ili estas unu triono. Anstataŭ la nuna regulo, laŭ kiu oni elektas po unu komitatano B por ĉiu komencita milo da individuaj membroj, oni povus elekti po unu por ĉiuj 500 membroj. Due, nun la Estraro gvidas la Komitaton funkciante kiel ĝia prezidio, kio ne konformas al la spirito de demokratio. La Komitato devus kontroli la agadon de la Estraro sendepende, sed nun la Estraro mem gvidas sian propran kontroladon, kio en la praktiko paralizas la superan organon de UEA.

Necesas ke la Komitato kaj Estraro havu malsamajn prezidantojn. Mi kredas je demokratio kiel aktiviga forto: ju pli la individuaj membroj ĝenerale kaj komitatanoj aparte sentos, ke ili mastras sian Asocion, des pli aktivaj ili certe fariĝos.

DEM: En Zagrebo UEA ricevis novan laborplanon. Ĉi vi atendas de ĝia realigo bonajn fruktojn?

OB: Mi emas al pesimismo, ĉar ni faris jam tiom da planoj, kiujn ni poste rapide forgesis. En Zagrebo la Komitato forgesis tuj ĉe la elekto de nova Estraro, ke unu el la bazaj celoj de tiu plano estas plijunigo de nia aktivularo, kaj elektis Estraron kun averaĝa aĝo 10 jarojn super tiu de la antaŭa Estraro, kiam ĝi estis elektita. La Komitato devis mem doni bonan ekzemplon pri tio, ke la laborplano estu prenita serioze. Tio denove montris, ke la Komitato estas paralizita, pro kio eĉ en la elektado de la Estraro ĝi ne estis sufiĉe veka.

DEM: Preskaŭ samtage kun via laŭreatiĝo estis anoncita la rezulto de la balotado por la Senato de la Esperanta Civito. Kiun opinion vi havas pri ĝi?

OB: Mi trovas ĝian bombastan veston malplaĉa kaj eĉ ridinda. Kvankam ĝi finfine restos nur marĝena fenomeno, ĝi ja ĝenas per siaj eksceso kaj per la paranoja ĉikanado pri UEA fare de iuj ĝiaj protagonistoj. Mi esperas, ke pli prudenta sinteno al UEA tie tamen baldaŭ superregos. Cetere, kun

intereso mi notis, ke la partoprenaktiveco en la balotado de la Civito estis konsiderinde malpli alta ol en la balotado pri la komitatanoj B de UEA.

DEM: Kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, ekzilate al nelogata insulo?

OB: Unue, "En barko senpilota" por povi ĝui tie la tutan verkaron de William Auld kaj ne nur "La infana raso". Due, "Malvivaj animoj" de Gogol, ĉar ĝi obstine fascinas min ekde mia lerneja aĝo kaj mia amiko prizorgis ĝian Esperantan eldonon. Trie, "Esperanto en perspektivo" por havi memorapogilon por rezonado pri la afero, al kiu mi dediĉis min sur la kontinento.

LA KVARA INTERNACIA FOTOKONKURSO

"La Ondo de Esperanto" organizis en 2001 la kvaran Internacian Fotokonkurson, en kiu partoprenis 46 fotoverkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Litovio, Pollando, Ruslando.

18.1.2002 la juĝkomisiono anoncis la premiojn: 1. Anna Skudlarska (Pollando) pro "Estimo" kaj "Revo"; 2. Gražvydas Jurgelevičius (Litovio) pro "Avo kaj nepoj"; 3. Robert Kamiński (Pollando) pro "Sonorilturo". Laŭdaj mencioj: Raita Pyhälä (Finnlando) pro "Ĝuu"; Igorj Lojkin (Ruslando) pro "Fangorn"; Andrea Ottrok (Hungario) pro "Ankaŭ tio estas Frankfurt".

Halina Gorecka

"ORAJ KANTOJ" APERIS

La rusa teamo de REU kolektis la plej konatajn, plej ŝatatajn kantojn de la lastaj jardekoj kaj eldonis ilin en du kompaktdiskoĵoj sub la nomo "Oraj kantoj".

Serĉatas nova TEJO-volontulo en la Centra Oficejo

Ĉu vi estas juna (de 20 ĝis 30-jaraĝa), malferma kaj scivolema pri la mondo, posedanta parole kaj skribe Esperanton, la anglan kaj eble ankaŭ aliajn lingvojn, scias labori komputile kaj estas libera dum minimume ses monatoj, ideale 12 monatoj?

Se vi povas respondi ĉiujn tiujn demandojn per entuziasma "Jes!", konsideru fariĝi volontulo de TEJO!

Kiel nia volontulo vi laboros en la Centra Oficejo de TEJO kaj UEA en Roterdamo (Nederlando), tie vi loĝos kaj ricevos semajnan poŝmonon.

Kontaktu nin pri pliaj detaloj:

TEJO, Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,
<ghen.sek@tejo.org>

POST FORTALEZO KAJ GOTENBURGO UK IROS AL PEKINO KAJ VILNIUSO

La Estraro de UEA, kunveninta en Roterdamo 11-13-a de januaro 2002, interalie decidis principe pri la estontaj

Universalaj Kongresoj. Por 2004 la Estraro akceptis la inviton de Ĉina Esperanto-Ligo okazigi Universalan Kongreson en Pekino. Oni antaŭvidas subtenon de la ĉina registaro kaj entuziasman kunlaboron de la ĉinaj movadanoj. Por 2005 estis akceptita la invito de Litova E-Asocio. Tiam la 90-a Universal Kongreso de Esperanto gastos en la ĉefurbo de Litovio, Vilniuso. Ĉar en 2005 estos la centjara jubileo de la 1-a UK oni antaŭvidas specialan antaŭkongresan programon en Bulonjo-sur-Mar (Francio), kiu mem estas tro malgranda por gastigi modernan UK.

KOMUNIKADA CENTRO EN BRUSELO

Baldaŭ en Bruselo aperos Komunikada Centro, kiun intencas starigi Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) kunlabore kun kelkaj eŭropaj E-asocioj. Ĝi situos maksimume proksime al eŭropaj instancoj, fondaĵoj, miloj da diverslandaj ĵurnalistoj kaj internaciaj neregistaraj organizoj. La celo de la Centro estos profesinivele informi la eŭropajn kaj ankaŭ tutmondajn amas-komunikilojn pri la lingvaj problemoj, faktoj de lingva diskriminacio, proponante sekve de tio informojn pri la ekzistanta solvo prezentata de Esperanto.

La motoro de la ideo kaj la ĉefa laborforto en la komenca stadio estos brusela ĵurnalista David Ferguson, kimrodevena irlandano, bone orientiĝanta en la brusela Babelo.

Post 20 jaroj da AIS-laboro: Alvoko al la esperantistaro universitatnivele kunagi

La spertoj faritaj en la AIS-klerigejoj en Bydgoszcz, Moskvo kaj Karlovo pravas, ke la nombro de novaj parolantoj inter scienculoj multe pli rapide kreskus, se la Akademio ne limigus sian instruadon al duondeko da unusemajnaj, diverslokaj studadsesioj, sed ebligus kompletan studadon en propra universitato aŭ almenaŭ fakultato "jure kaj mure" ekzistanta.

La baza principo estas ebligi al laŭeble ĉiuj internacilingvaj universitatnivele instruistoj kaj aliaj sciencistoj, ke ili investu en la klerigadlaboron de la Akademio parton de sia libera tempo, pri kiu ili disponas dum sia laborvivo forme de ferioj kaj poste, kiel emerituloj, ajntempe. Tio ne necesigas translokiĝi al loko, kie AIS-fakultato respektive AIS-universitato havas sian muran kaj juran sidejon.

Dua principo konsistas en la postulo de AIS, ke la finstudintoj verku siajn disertaciojn dulingve, en sia preferata pensadlingvo kaj en la Internacia Lingvo. Tiel ne nur ĉi tiu evoluas kaj tiu konserviĝas kiel sciencolingvo, sed tiu ĉi "kognitiva dulingveco" kondukas al pli preciza vortigado kaj pli profunda pensado, liberigitaj de lingvecaj penskliŝeoj.

Tria principo estas, unuavice subteni la studadon kaj akademian karieron de junaj fortoj, ne lastavice per la ebligo de eksterlanda universitatpedagogia prak-

tikumo..

La Lucian-Bлага-Universitato Sibiu-Hermannstadt (Rumnanio), jam starigis kune kun AIS du komunajn katedrojn ("komunikadscienco kaj eŭrologio", la alia pri "aplikata informadiko") kaj ebenigis la vojon al du pluaj tiaj "internaciaj katedroj" ("Interlingvistiko, Faklingvoteorio kaj tradukadscienco" kaj "Humanistika Psikiatrio kaj Medicina Psikologio"). Estas interkonsentite, ke, ekde kiam la tria komuna katedro estos komencinta sian laboron, ĉi tiuj katedroj fariĝu la komenco de aparta fakultato kun speciala statuto.

Plikonkretigante la jam subskribitan kunlaborkontrakton de la Lucian-Bлага-Universitato kun la partnero de AIS en Slovakio, nome kun la Filozofo-Konstantin-Universitato Nitra, ankaŭ ĉi ties pedagogia fakultato komencis starigi unuajn komunajn katedrojn kun AIS. Ili fariĝu jam 2002 la kerno de privata universitato fondota kvin dekojn da kilometroj pli sude en la dulingva urbo Komarno, kiun disdividas en du urbopartojn la Danubo kaj (ekde la fino de la unua mondmilito) la en ĝi situanta slovaka-hungara landlimo.

*Oprof Dr.habil. Helmar G. FRANK
Prezidanto de AIS*

Pliajn detalojn petu ĉe:

hfr@uni-paderborn.de
Fakso 0049-5251-163533

letere Prezidanta Sekretariejo de AIS,
KleinenbergerWeg 16B, D-33100
Paderborn

Esperanto en Ĉinio

Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA, Ĉinio) okazigis la 8-an LEA-Kongreson de Esperanto, el kiu naskiĝis la nova kaj pli juna estraro, kaj la 3-an Nordorientan Ĉinan E-Kongreson kune kun Jilin-provinca E-Instituto. Por akiri vastan subtenon kaj kunlaboron ni publikigis la unuan kvinjaran planon de LEA por 21 jarcento. La agado "Propono al E-istoj en Ĝemelaj Urboj" jam ricevis reagojn el pli ol 50 landoj. Nia organo "Verda Stelo" refariĝis gazeto. Pli ol 200 personoj ĉeestis la diversajn E-kursojn de LEA kaj ĝiaj filioj en la urboj. Liaoning Financa Kolegio enkondukis Esperanton kiel unu el la nedevigaj studobjektoj sub nia penado.

amikeco999@21cn.com

Kompaktdisko DUONE

Thierry Faverial revenas soliste kun KD en kiu li rolas kiel komponisto, muzikisto, kantisto kaj aŭtoro de kelkaj tekstoj, por prezenti 10 kanzonojn, kies plej granda parto estas originala. Per sia melodia riĉeco ili miksas la spicajn saporojn de intimeca latinjazo kun la diversaj ritmoj de la eŭropa kanzonaro. Ĉiu el la titoloj estas invito al vojaĝo, en aparta etoso, kiu foje kondukas al revemo aŭ dramo, foje al voluptemo aŭ poezio.

Interesa faka aplikado

La Unio de Raciismaj Ateistoj kaj Agnostistoj (UAAR) - laboranta por la re-samrajtigo de nekredantoj - aperigas siajn retpaĝojn en pluraj lingvoj, inter ili

ankaŭ en Esperanto, kion ili volonte utiligas por la internaciaj kontaktoj: <http://www.uaar.it/uaar/esperanto.htm>

Stomatologio

La prezidanto de Stomatologia Sekcio de UMEA anoncas la kreon de ret-listo, kiu celas anstataŭigi la paperan bultenon "Stomatologia Forumo": <http://groups.yahoo.com/group/umea/>
Ne forgesu ankaŭ viziti: <http://www.esperanto.org/umea/odonto>



Infandeseĝnaĵoj

La E-rondeto en Vyškov preparas ekspozicion de infandeseĝnaĵoj (kun konkurso) en marto. Detalajn informojn pri la partopreno oni povas peti ĉe: Esperanto-rondeto, MKS, Josef Vojaček, Jana Šoupala 4, CZ-682 01 Vyškov, Ĉeĥio. Rete: vojacek@jumbo.ped.muni.cz

Novjara donaco por Esperantio

estas, ke ekde la 1-a de januaro post longa antaŭpreparo, en la Esperanta retpaĝaro de Radio Aŭstria Internacia ekfunkciis la ligilo por aŭskulti la elsendojn de Radio Havano Kubo! http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html

Bonvolu viziti ĝin kaj sendi al ambaŭ radiostacioj retmesaĝon pri la aŭskultado!

Maritza kaj Katinjo Fettes

Agado Espero: Zaban-e-salam Lingvo de paco

La Esperanto-movado en pluraj manieroj bedaŭris pro la viktimoj de la atencoj en Usono dum la pasinta septembro. Same bedaŭrindaj estas la senkulpaj viktimoj de la milito en Afganujo. Ne estas multo, kion ni povas fari en ĉi tiu milito. La gloraj agoj de niaj antaŭuloj dum, ekzemple, la unua mond-milito ne estas nun ripeteblaj. Por tamen substreki la respekton por ĉiuj viktimoj, la Azia Komisiono de UEA, kun la helpo de kelkaj neaziaj esperantistoj, decidis lanĉi kampanjon, per kiu ni rekte prenas la flankon de la nunaj viktimoj, la afganaj rifuĝintoj en najbaraj landoj.

En Irano loĝas pli ol 4 milionoj da afganoj kiel rifuĝintoj. La plejmulto estas analfabetoj, sed ekzistas inter ili instruistoj, inĝenieroj kaj kuracistoj, kiuj en sia lando havis bonan vivon, sed pro la longa milito rufuĝis al Irano. Similaj estas la kondiĉoj en aliaj najbaraj landoj.

La kampanjo, kies nomo en la persa kaj en Esperanto estas "Zaban-e-Salam ", /Lingvo de Paco/ konsistas el tri eroj:

- 1 - kursoj de Esperanto por afganaj intelektuloj en la najbar-landaj rifuĝejoj;
- 2 - kursoj por alfabetigi en la nacia lingvo afganajn analfabetajn rifuĝintojn;
- 3 - materia helpo al la rifuĝintoj;

La unuaj konkretaj agadoj komenciĝos en Irano pere de la helpo de iranaj esperantistoj kaj iranaj neesperantistaj asocioj, kiuj jam okupiĝas pri alfabetigo.

Laŭgrade ili estos vastigataj al aliaj najbaraj landoj. La funkciigo de kurso de Esperanto por 20 rifuĝintoj kostas 100 usonajn dolarojn (multobligo de disdonotaj materialoj, ktp.), perkoresponda kurso po 15 dolarojn, same kiel alfabetigo de unu analfabeta afgana rifuĝinto. Ĉi tiu agado komenciĝos tuj, kiam venos la unuaj kontribuoj de esperantistoj, kiuj volas fariĝi subtenanto de unu afgana analfabeto, kiu lernu legi kaj skribi.

Materia helpo al la rifuĝinto estas libervola. La mono kolektota en la E-movado estos rekte aŭ prefere en formo de materialoj bezonataj transdonita al la rifuĝintoj.

Mi certas, ke pluraj el vi volos partopreni kaj instigi la esperantistojn de sia lando partopreni. La maniero por kontribui estas simpla: sendu vian monan subtenon al la konto Azia Fondaĵo ĉe UEA, per la kutimaj pagmanieroj al UEA. Vi rajtas indiki "lingvo de paco 1", (aŭ 2 aŭ 3) depende de la celo, kiun vi volas subteni..

Se vi volas rekte korespondi pri la kursoj de Esperanto kaj pri la alfabetigaj kursoj, bonvolu sendi mesaĝon al "Reza Torabi" <reza@esperanto.org>; pri materiaj helpoj sendu mesaĝon al "Hans Bakker" <hbakker@groenlinks.nl>; ĝenerale pri la kampanjo kaj pri la maniero popularigi ĝin inter esperantistoj bonvolu sendi ret-mesaĝon al "Atilio Orellana" <iei001@worldonline.nl>. Dankon!

*Renato Corsetti
Prezidanto de UEA*

Příjmy	ROZPOČET		Rok 2002 návrh
	Rok 2001 plán	skutečnost	
členské příspěvky	100 000,-	108.807,-	100 000,-
prodej knih	20 000,-	23 259,-	20 000,-
písemné kurzy	10 000,-	6 134,-	10 000,-
Starto předplatné	1 000,-	332,-	700,-
úroky v bance	2 000,-	300,-	300,-
dary členů	20 000,-	45 496,-	20 000,-
konference (sjezd) ČES	70 000,-	53 250,-	60 000,-
prodej akcií	10 000,-	42 289,-	---
OSIEK	5 000,-	---	1 000,-
ost. příjmy (UEA a sekce)	97 000,-	75 755,-	70 000,-
konverz. kurzy	40 000,-	15 120,-	20 000,-
jazykové zkoušky	---	1 500,-	---
celkem	375 000,-	372 242,-	302 000,-
Výdaje			
režijní materiál	7 000,-	8 044,-	5 000,-
náklady prodej knih	7 000,-	13 747,-	8 000,-
cestovné	25 000,-	17 993,-	20 000,-
poštovné	15 000,-	5 282,-	8 000,-
telefon a internet	15 000,-	11 826,-	15 000,-
funkční odměny	7 000,-	6 630,-	7 000,-
nákup služeb	40 000,-	35 495,-	35 000,-
daně	7 000,-	7 411,-	8 000,-
poplatky bance	---	8 190,-	8 000,-
konference (sjezd) ČES	60 000,-	47 147,-	50 000,-
Starto - tisk a exp.	90 000,-	95 784,-	75 000,-
písemné kurzy	2 000,-	6 300,-	8 000,-
odměny	5 000,-	---	5 500,-
muzeum Č. Třebová	2 500,-	2 500,-	2 500,-
nájem Běchovice	27 000,-	26 667,-	27 000,-
dary a reprezentace	5 500,-	---	5 000,-
konverzační kurzy	40 000,-	13 065,-	15 000,-
ostatní výdaje (UEA, sekce)	---	---	60 000,-
vrácení půjčky KAVA-PECH*	20 000,-	20 000,-	---
celkem	375 000,-	326 081,-	362 000,-

* firma KAVA-PECH půjčila uvedenou částku Českému esperantskému svazu

Novuloj en la CO UEA

La estraro de UEA nomumis Agantan Ĝeneralan Direktoron por la jaro 2002. Temas pri Trevor Steele (ekde 1.1.2002)

William Trevor Steele naskiĝis la 14.5.1940 en Mareeba, Aŭstralio, kaj havas aŭstralian naciecon. Li estas vaste konata kiel instruisto en pluraj landoj kaj sukcesa verkisto. Li decidis akcepti la defion restarigi kunlaboran etoson en UEA kaj pli ĝenerale en la movado. Lia personeco kaj entuziasmo por la nova tasko estas sufiĉaj garantioj pri lia sukceso, pro kio la estraro formulas multajn bondezirojn kaj petas la esperantistojn, membrojn kaj nemembrojn, kunlabori kun li.

La estraro nomumis redaktoro de la revuo "Esperanto" de UEA por la jarkolekto 2002-a **Stano Marček** el Slovakujo (48-jara), kiu havas longan historion de redaktado de pluraj revuoj landaj kaj internaciaj. Li estas konata ankaŭ kiel aktivulo en pluraj kampoj de la movado (fondo de la junulara sekcio, instruado ktp.). Li ekredaktos la numeron 1-an de la jarkolekto 2002-a.

Ambaŭ nomumoj estas por la transira jaro 2002-a, dum kiu la Oficeja Komisiono de UEA pluserĉos kandidatojn por pli long-tempaj kontraktoj por ambaŭ postenoj. Kompreneble kaj Trevor kaj Stano estos inter la kandidatoj por tiuj kontraktoj.

Fermiĝas per tio la unua fazo de la laboro de la Oficeja Komisiono, kiu jam komencis okupiĝi pri aliaj bazaj

problemoj: reorganizado de la komputila sistemo de UEA kaj helpo al malfermo de la "komunikad-centro" de EEU en Bruselo, dum daŭras konstanta provo reharmonigi la funkciadon de la Asocio.
CO de UEA

Heroldo sen ĉefredaktoro!

Stano Marček, ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto, forlasis tiun postenon, nova redaktoro ankoraŭ ne estas nomumita. La nova adreso de Heroldo estas: Heroldo de Esperanto, CP 1251, CH-6830 Chiasso 1, Svisio, retadreso: <lf.koop@infinito.it>

Inĝ. Milan ZVARA forpasis

Multjara esperantista aktivulo, motoro de la slovaka E-movado, fondinto, funkciiganto de la fama turismejo Poprada kaj nuntempa prezidanto de SKEF, forlasis nin por ĉiam merkrede, la 30an de januaro 2001 en matenaj horoj.

2002

"Programistoj respondas"

Naskiĝis retlisto por respondi al demandoj pri interreto kaj komputado (ekzemple: *kiel montri supersignojn en retpaĝo, kiel konverti tekston al Unikodo, kie trovi aŭ kiel krei belajn grafikaĵojn, kio estas xml, cgi, pdf, ktp.*) Vidu: <http://groups.yahoo.com/group/programistoj-respondas/>

KAEST 2002

Konferenco *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko* okazos en Dobříchovice apud Prago en novembro (2002-11-08/10) sub aŭspicioj de UEA. La ĉefa temo de la konferenco: **Elektronikaj rimedoj** (sekcio A), la akompanaj temoj jam tradicie estas *Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto* (sekcio B) kaj *Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko ĝenerale* (sekcio C). Aŭtoroj de kontribuajoj estas petataj sendi siajn aliĝilojn kun titolo de la kontribuo kaj mallonga resumo (ne pli ol 50 vortojn) se eble plej frue, sed plej malfrue ĝis 2002-08-15. Ĝis 2002-09-15 ili estos informitaj, ĉu ilia kontribuajo estis akceptita. Post la konferenco estos eldonita bonkvalita prelegkolekto. **Honoraj membroj de UEA kaj ĈEA** rajtas aliĝi senpage ĝis mezo de aŭgusto, poste ankaŭ ili devos pagi. La partoprenkotizo (inkluzivas la libro-forman prelegaron) estas 30 EUR (A-landoj), 15 EUR (B-landoj) ĝis la 15-a de aŭgusto, poste iom pli. Loĝado por persono kaj nokto kostas 16 EUR (en unulita ĉambro), 11 EUR (dulita ĉ.), 8 EUR (kvarlita ĉ.), manĝado 20 EUR. Aliĝilojn petu ĉe KAVA-PECH Dobříchovice, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříchovice, tel. 420.2.9912201, fakso: 420.2.9912126, rete: kaest@kava-pech.cz, <http://www.kava-pech.cz/kaest>

Upozornění: Pro občany České nebo Slovenské republiky stojí účastnický poplatek včetně sborníku přednášek 250

Kč, noc se snídaní v dvoulužkovém pokoji 280 Kč, ve čtyřlužkovém 240 Kč. Toto zvýhodnění však končí 15.8.2002. Platby poukažte na konto 555444-051/0100, variabilní symbol 21108, nejlépe v kterékoliv pobočce KB. Slováci mohou použít mezinárodní platební poukázku MP16.

Bokarev-vortaro akiris komputilan formon!

Alex Timashov <atv@rbcmil.ru> ĵus kreis bonege funkciantan programon eVortaro surbaze de la trovebla rete (<http://www.esperanto.mv.ru>) Esperanto-Rusa vortaro de Bokarev. Nun tio estas vera komputila vortaro, kun multaj tipaj oportunaĵoj:

- vi povas simple entajpi ĉu rusan, ĉu esperantan vorton kaj ĝi tuj troviĝos!

- vi povas kopii nekonatan vorton el legata teksto kaj eVortaro tuj tradukos ĝin!

- kiam vi ĝin ne bezonas, la programo kaŝiĝas en la Vindaĵo pleto en la formo de verda steleto - kaj estas elvokebla de tie per unu klako.

La aŭtoro konstruis repaĝon por kaj pri la programo ĉe la adreso <http://www.evortaro.narod.ru>

La programo estas libere deŝutebla kaj uzebla. Ĝi jam eniris la renovigitan version de la lumdisko "Esperanto XXI: rezultoj de la 2001-a jaro" (kune kun ĵusfarita komputilvortara versio de la Reta Vortaro - la plej granda ilustrita E-vortaro en la reto).

Andrej Grigorjevskij

Lingvaj ludoj kaj enigmoj

(9)

Solvo de la pseŭdoafiksoj el la antaŭa numero:

15. manio, maniero

16. natrio, bona trio

En poemoj kaj kantoj estas ordinare uzataj **rimoj** kiel lingvaj ornamoj. Temas pri la vortoj, kiuj havas la saman vortofinon, konkrete akcentitan silabon kaj sekvan finaĵon. Ekzemple:

sendas - mendas - vendas

mono - duono - kolono

kant' - Esperant' - plant'

bela - fabela - kastela

Ĝustaj rimoj **ne estas**, se temas pri la ne akcentita silabo, ekz. areno - telefono, sidas - havas. Ĝustaj rimoj ankaŭ ne estas tiuj, kiuj estas formitaj nur per la samaj sufiksoj, ekz. ĝojadi - kantadi, neĝero - monero.

Trovi certajn rimigantajn duopojn aŭ kelkopojn, estas temo de la enigmo kun nomo

RIMLUDO

La divenotaj vortoj povas esti en propono de la enigmo aluditaj per streketoj aŭ punktoj. En kontinua teksto aŭ rimaĵo ili ordinare estas signifitaj per sinonimoj aŭ preskaŭsinonimoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

La ne reciprokata amo estas

ofte - - - - - de la - - - - -.

Solvo: doloro, koro

Multajn artifaĵojn scias
tute certe la amik'

sed pro tio fieregas
li tro en la polemik'.
Solvo: konas, fanfaronas.

La **internoj** de **psikoj** sin malkaŝas

sen sekretoj

en la versoj kun **eldiroj** plenaj de la epitetoj
kune kun belsonaj **agordoj** en poemoj

de poetoj.

Solvo: intimoj, animoj, esprimoj, rimoj

Kaj nun divenu jenajn du rimludojn:

17. La trono estas - - - - de - - - - .

18. En varmsezone dum antaŭnokto

ĉe akvofluo mi eksidis,

kiel monta transversaĵo

sunon kaŝis mi ekvidis.

Josef Cink

La mondo sen militoj laŭ Einstein

Tiel ni povus libere traduki la ĉeĥlingvan libron de Jiří Vančura (*Einsteinovo řešení světa bez válek*. Eldonis Doplněk Brno 2001, 168 p.). Sur la paĝo 151 la aŭtoro diras: "La tuta sistemo de internacia sekureco ne povas avantaĝigi la superpotencojn kontraste al malgrandaj landoj, ankaŭ la komuna lingvo ne devas favori iun ajn naciecon. Por eviti konfliktojn, ĉu elekti lingvon artefaritan aŭ minoritatan? Ĉu Esperanton aŭ ekzemple la hungaran?"

Kafejo super Prago

La libro de la lasta praga germanlingva verkistino Lenka Reinerová (*Kavárna nad Prahou*, eldonis Labyrint 2001) estas por ni interesa pro la foto de la kafejo Union antaŭ preskaŭ cent jaroj (p. 10), sur kies angulo estas klare videbla ŝildo kun surskribo: *Bohema Unio Esperantista*.

Umberto Eco: Hledání dokonalého jazyka

v evropské kultuře. (*La serĉado de la perfekta lingvo en la Eŭropa kulturo*). Tradukis Zora Jandová, eldonis Lidové Noviny 2001, prezo 295 Kč.

La ĉeĥa traduko de la fama verko de Umberto Eco pri planlingvoj aperas ĉĥlingve kiel tria volumo de la libroserio *Formado de Eŭropo*, kiu havos sume 25 volumojn kaj kiu laŭdire aperos en 28 lingvoj. En 1996 la libro aperis ankaŭ en Esperanto (tr. Daniele Mistretta). La glora aŭtoro parolas pri kabalo kaj magiaj lingvoj, pri Dante, Nikolao de Kusano, Descartes, Leibniz kaj Komenio kaj kompreneble ankaŭ pri volapuko, Esperanto kaj interlingua, kiujn li monas komune IHL (Internacia Helpa Lingvo). Eco opinias, ke IHL povus sukcesi, se ĝi ricevus oficialan subtenon kaj se ekzemple almenaŭ unu televida kanalo en ĝi elsendus filmojn, kiujn la homoj povus ĉiutage aŭskulti. La libro enhavas antaŭparolon de Jacques Le Goff, iniciatinto de la projekto *Formado de Eŭropo*, en kiu li klarigas la celon de la projekto. Tiu antaŭparolo estas parto de ĉiu libro en la serio en ĉiuj lingvoj. Diference de alilingvaj eldonoj la ĉeĥa eldono enhavas ankaŭ postparolon de la ĉeĥa lingvisto František Čermák, kiu klopodas konvinki la leganton, ke IHL ne havas ŝancon en konkurenco kun la angla. Malgraŭ tio estas grave, ke multegaj admirantoj de la itala aŭtoro ekscios pri la problemoj kaj pri opinioj de Eco. Bedaŭrinde la libro ne estas facile akirebla kontraste kun du aliaj volumoj

(Ulrich Im Hof: *Eŭropo kaj klerismo*; Josep Fontana: *Eŭropo antaŭ spegulo*), aŭ pro granda intereso de Eco-legantoj aŭ pro malgranda eldonkvanto (?), kiu ne plu estas indikata en la libroj.



Foriris aŭtorino por infanoj

Lunde la 28-an de januaro 2002 anoncis televido tra la tuta mondo, ke forpasis unu el la plej gloraj aŭtoroj de porinfana literaturo, la sveda verkistino Astrid Lindgren (14.11.1907), kies plej fama verko *Pipi Ŝtrumpolonga* estis esperantigita, same kiel *Emilo de Smolando*, *Ronjo, rabista filino* (atingebla per interreto ĉe eLibrejo) kaj *La fratoj Leonkoro*, kiun proponas nia Libroservo. Fama estas ankaŭ ŝia knaba detektivo Kalle Blomkvist. Multaj verkoj, kiuj aperas tra la tuta mondo, estis filmigitaj.



Libroservo

Nabídka zboží

Libroservo Českého esperantského svazu v Praze pro rok 2001. Zboží uváděné v tomto seznamu si můžete objednat na adrese:

LIBROSERVO ČES, c/o: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha 5 - Hlubočepy
Tel.: 02/5181 77 32,

E-mail: m.pluharova@tiscali.cz

Při větších nákupech poskytujeme **množstevní slevy** takto: při odběru zboží

nejmenší za	poskytuje se sleva
- 200,- Kč	10%
- 500,- Kč	15%
1 000,- Kč	20%

Výše uváděné slevy poskytujeme jak klubům esperantistů, tak i jednotlivým členům ČES. Tyto slevy **neplatí** pro prodej do **zahraničí** a při prodeji ve **stáncích Libroserva** během sjezdů, konferencí a ostatních setkáních esperantistů.

Ceny uváděné v tomto seznamu jsou v **Kč** a neplatí pro prodej do zahraničí!

Při **zásilkové službě** (tj. Poslání zboží poštou) **připočítáváme** k ceně zboží expediční náklady, tj. **poštovné a balné**.

Objednávky vyřizujeme v pořadí, v jakém docházejí, až do vyčerpání zásoby. Ne vždy můžeme zaručit dodatečnou dodávku, zvláště u starších nebo zahraničních vydání.

Platit je možno buď svazovou **poštovní poukázkou A-V** na kterémkoliv poštovním úřadě, nebo **pokladní složenkou** u kterékoli pobočky Komerční banky. Číslo účtu Českého esperantského svazu je 3330-021, kód banky (KB) je 0100; jako variabilní symbol se uvádí číslo faktury (dodacího listu).

Novájojen Libroservo

- 3.28+ Eli Urbanová: Hetajro dancas (700,- Kč)
- 4.14+ J. Rumler: Lasta Ĉevalo (120,- Kč)
- 6.24 Fakaj Aplikoj de Eo (KAEST 2000) (150,- Kč)
- 8.05 KA(2) Najado (370,- Kč).

Malkariĝo:

- 6.02 AEST 1989 30,00 Kč (antaŭe 45 Kč)
- 9.04 Odnazak ČES 5,00 Kč (antaŭe 10 Kč).

1. Učebnice k jazykovým zkouškám

- 1.04 Chrdlovi: Esperantem za tři měsíce (69,-)
- 1.05 Cink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé (24,-)
- 1.06 Vondroušek: Historie a spisovatelé (10,-)
- 1.07 Vondroušek: Historio kaj biografioj (10,-)
- 1.09 Kilian: La Mondo Rakontas (LMR) (10,-)
- 1.10 Kamarýt: Historio de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio (20,-)

- 1.16 Malovec: Gramatiko de Esperanto (Dua eldono) (130,-)

2. Slovníky

- 2.01 Kilian: 808 nejužívanějších slovních kmenů v esperantu (8,-)
- 2.02 Kilian: Esperantsko-český a česko-esperantský slovníček (10,-)
- 2.03 Hromada: Esperantsko-český a česko-esperantský kapesní slovník (20,-)
- 2.04 Bří Filipové: Velký slovník česko-esperantský (20,-)
- 2.05 Kraft-Malovec: Slovník esperantsko-český (129,-)
- 2.06 Kraft: Slovník česko-esperantský (23566 hesel) (188,-)
- 2.07 Rybář: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj (10,-)
- 2.08 Traxler: Ĉesko-esperantský právnícký slovník (25,-)
- 2.09 Traxler: Esperantsko-český právnícký slovník (25,-)

3. Povídky, romány a jiná próza

- 3.01 Čapek: Milito kontraŭ Salamandroj (95,-)
- 3.04 Kožík: Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj heroa vivo de J.A. Komenský. + El la saĝo de Komenio + Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro (26,-)
- 3.05 Hašek: Ne nur soldato Švejk (126,-)
- 3.07 Echnert: Sep tradukoj (Jirásek, Zeyer, Šrámek, Malířová, Tilschová, Baar, Vrba) (13,-)
- 3.10 Bauer: La fenomeno Svislando (35,-)
- 3.13 Rumler: Abunde kaj redunde (4,-)
- 3.17 Havel: Aŭdienco (42,-)
- 3.18 Kafka: Songo kaj aliaj rakontoj (126,-)
- 3.19 Schnitzler: Songonovelo (126,-)
- 3.20 Kurisu Kei: Co mi dala česká literatura (30,-)

- 3.21 Philippe: Badenlanda Legendaro (126,-)
 3.23 d'Arbaud: La besto de Vakareso (98,-)
 3.24 Tvarožek: Ŝercoj 1 (12,-)
 3.25 Tvarožek: Ŝercoj 2 (12,-)
 3.26+G. Pausewang: La lastaj infanoj de Oldrovalo. (57,-)
 3.27+Astrid Lindgren: La Fratoj Leonkoro (95,-)
 3.28+Elĉi Urbanov: Hetajro dancas (700,-)
4. Bsn, sbirky bsn
 4.01 Urbanov: El subaj fontoj (16,-)
 4.02 Urbanov: Peza vino / Tžk vino (39,-)
 4.03 Karen (Kofnek) - Rumler - Urbanov - Vidman: Kvarfolio (4,-)
 4.05 Kofnek: Elektro el la originalaj kaj tradukitaj poemoj (5,-)
 4.07 K.H. Mcha (tr. Pumpr): Majo (62,-)
 4.09 Ludkov: Ekadi la animon / Uslyet dui (96,-)
 4.10 Gazda: Frenezetajoj (10,-)
 4.12 Vra Ludkov: Uslyet dui 1 + 10 (96,-)
 4.13 Vra Ludkov: Uslyet dui 1 + 16 (96,-)
 4.14+ Josef Rumler: Lasta evalo (120,-)
5. Zpvniky
 5.01 Cink: Societa Kantareto (24,-)
6. Odborn knihovna
 6.01 Kolekto de referaoj el internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1982". Energio - tutmonda problemo (10,-)
 6.02 Kolekto de referaoj el internacia seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1989". fervojoj (45,-)
 6.03 Werner: Terminologia Kurso (20,-)
 6.04 Tma: La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo (9,-)
 6.05 Internacia Seminario pri Komenio, 1992 (10,-)
 6.06 Maxwell-Preotu-Tacu: Lingvo kaj kibernetiko (142,-)
 6.07 Chrde (ed.): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo (147,-)
 6.08 Frank: Mallonga enkonduko en la kibernetikan pedagogion (92,-)
 6.09 Chrde: Profesia uzo de Esperanto kaj iaj specifaj trajtoj (38,-)
 6.10 Yosimi Umeda: Jak uspsn vyjednavat s Japonci (30,-)
 6.11 Vogelmann: La Nova Realismo (bindita) (150,-)
 6.12 Vogelmann: La Nova Realismo (brourita) (63,-)
 6.15 Fossmeier: ifrado kaj ia rolo en la "nova komunikado" - Pri objektiveco en la scienco (30,-)
 6.16 Kavka: Kontribue al PIV (30,-)
 6.17 KAEST '98 (Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) - programo (15,-)
 6.18 Streda: Terminaro de feloj / Nzvoslov kzi (126,-)
 6.19 Frank a spol.: Kybernetische Pdagogik /Klerigkibernetiko - 6 (880,-)
 6.20 Frank a spol.: Kybernetische Pdagogik /Klerigkibernetiko - 7 (880,-)
 6.22 KAEST '98: Modernaj rimedoj de komunikado - prelegaro (150,-)
 6.23 Werner: Matematika vortaro Esperanta-ea-germana (20,-)
 6.24 KAEST 2000: Fakaj aplikoj de Esperanto (150,-)
7. Mapy
 7.01 Poatlaso Praha (25,-)
8. Nosie zvukovho zznamu
 KA = mag. gazeta, CD = komp. disk
 8.01 KA: Team en Esperanto (58,-)
 8.02 KA: Famaj kantoj por belaj horoj (57,-)
 8.03 KA: Kantoj de l' popolo (57,-)
 8.04 CD: Kantoj de l' popolo (115,-)
 8.05 KA(2): Najado (du kazedoj) (370,- K)
9. Odnzaky
 9.01 Esperantsk hvzdika v blem kruhovem poli,  7 mm (5,-)
 9.02 Esperantsk hvzdika v blem kruhovem vysei, pod n v oblouku npis ESPERANTO, 10x17 mm (5,-)
 9.03 Odnznak esperantist-zdravotnk (5,-)
 9.04 Odnznak eskho esper. svazu (10,-)
0. Pohlednice a ostatn zboi
 0.01 Pohlednice "Saluton el Praha" (2,-)
 0.02 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha" (2,-) (text 1992)
 0.03 Pohlednice "Saluton el kongresurbo Praha" (3,-) (aktualizovan text 1996)

Ni kondolencas

14. 8.2001 **Vladimír Mašita** el Štoky
28.9.2001 **Jaroslav Lokšan**, Boletice
29.9.2001 **Adolf Vojtek**, Ostrava
8.11.2001 **Zora Vaverková** el Brno
8.11.2001 **Max Hillebrand** el Jablonec (70j, fama organizanto de IRDEN en Plavy kaj motoro de la klubo en Jablonec, populara persono inter esperantistoj)
25.11.2001 **Ladislav Fiala** el Poděbrady (forpasis en Pollando, unu monaton antaŭ sia 79-jariĝo); liaj lastatempaj laboroj estis ekspozicio Komenio-Zamenhof, kiu vizitis plurajn urbojn, ekspozicieto en Ĉeelba Muzeo en Poděbrady kaj festado de 90-jariĝo de Esperanto en la banurbo Poděbrady.

Max Hillebrand kaj Ladislav Fiala partoprenis la asocian konferencon en Poděbrady meze de oktobro 2001, kiam neniu antaŭsentis, ke ni vidas ilin la lastan fojon.

27.12.2001 **RNDr. Václav Vanc**, Ústí nad Labem

Rimarko de la redaktoro: mi petas pardonon, ke pro mia teknika eraro ĉe komputila prilaboro ne aperis la kondolencena artikolo jam en Starto 4/2001, por kiu ĝi estis preparita.

MORTIS KAMARADO IVO!

IVO (YVES) PEYRAUT, prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT, mortis la 5-an de januaro 2002, en sia 68-jaro, post grava malsano.

Informoj de la sekretario

Složení členské základy:

A 136, B 314, D 51, E 64, F 397
celkem 962 (31.12.2001)

Upozornění: Toto číslo Starta je poslední, které dostanete, pokud jste neuhradili členský příspěvek na rok 2002 !!!

Nejasné platby

V této souvislosti sdělujeme, že nám koncem roku 2001 i nyní po novém roce došly následující platby bez určené plátce: členství v ČES: dne 15.11.01 - 200.- Kč, 28.11.01 - 100.- Kč, 28.11.01 - 150.- Kč, 5.12.01 - 450.- Kč, 3.01.02 - 100.- Kč, 4.01.02 - 250.- Kč, 7.01.02 - 150.- Kč (2x), 16.01.02 - 250.- Kč členství v UEA: 20.12.01 - 1100.- Kč, 8.01.02 - 440.- Kč a 16.01.02 - 1100.- Kč. Pokud jste v tento den platili, sdělte to laskavě tajemníkovi, aby mohl provést kontrolu, zda se jedná o Vaši platbu!!

Návrhy do svazového výboru

Letošní rok je sjezdový, to znamená, že na podzim budeme volit nový výbor svazu a kontrolní skupinu. Člen výboru musí počítat s 20 víkendovými schůzemi výboru v tříletém volebním období a s plněním úkolů, kterými bude pověřen. Jedná se o neplacené pracovní funkce (hradí se pouze skutečné výdaje, tj. poštovné, jízdné, stravné apod.) Návrhy na kandidáty zaslejte předsedovi volební komise: Kvido Janšík, Lidická 41, 787 01 Šumperk.

KALENDARO 2002

19. - 21.4. 11-a Adonido, Ratíškovice
 22.-28.4. Esperanta seminario, Skokovy
 7. - 9.6. Paroliga kurso kaj asociaj ekzamenoj (Poděbrady)
 11.-16.6. EKOTUR - Ekoturisma renkontiĝo en Kvilda (Šumava)
 14.6.16.6. Esperanto en Máj Plasy
 50-a Somera Esperanto-Tendaro, Lančov:
 30.6.- 13.7. I. etapo
 14.7.- 27.7. II. etapo
 28.7.-10.8. III. etapo
 11.8.-17.8. ripoz-semajno (rekreační týden)
 20.7.-27.7. 55-a IKUE kongreso - Kroměříž
 1. 8.- 16.8. 87-a UK en Fortaleza Brazilo (flugkaravano de KAVA-PECH)
 23.8.-28.8. 5-a Eürop-Unia Esperanto-Kongreso - Verona (komuna karavano ne estos organizita)
 9. 9.- 14.9. 2-a IBIRE Dobřichovice (biciklado)
 14.9.-21.9. 4-a AEH-IKEH kongreso de handikapitaj esperantistoj - Jánské Lázně
 4.-6.10. 15a Internacia kultura festivalo Ústí
 8.11.-10.11. Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST). Elektronikaj rimedoj - sub aŭspicio de UEA - Dobřichovice
 22.-24.11. 10-a ĈEA Kongreso - 100-a jubileo de EK Prago
 7.12. 21-a Ĉeĥa-Saksa Tago en Ústí/L

Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně EK (sekce železn.) a místo do

kolony - vklad jménem. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo na inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

- 06940 ČES
 06941 UEA
 06942 předplatné Starta bez členství
 06943 dary ČES
 50100 sekce mládeže
 50200 sekce železničářů
 50400 sekce pedagogická
 50401 písemný kurs začátečníci
 50402 písemný kurs pokročilí
 50403 členství ILEI
 50500 sekce přátel SAT
 50600 sekce šachistů
 50700 sekce sběratelů
 50800 sekce nevidomých
 50900 sekce zdravotníků
 51000 sekce křesť. esp. KELI
 51100 sekce katol. esp. IKUE
 70100 komise pro tisk a inf.
 80200 ediční fond
 80300 propagace v tisku
 80400 fond Tilio

• **Výzva:** Vzor pro vyplnění pokladní složenky KB při platbě ČES vyšel ve Startu 3/2001, str. 67. Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemní-kovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

**Periodikum Českého esperantského
svazu (33. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(33-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto**

Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X